


ESPERANTOLEHTI

Esperanta Finnlando ♦ Esperantobladet ♦ syskuu ♦ septembro ♦ 4/2014



**Aŭtunaj Tagoj
en Iisalmi, p. 6-7**



La 99-a Universala Kongreso en Bonaero, Argentino, p. 4–5

♦ Vintraj Tagoj en Tampere 7.–8.3.2015, p. 9

♦ Raporteto de kursano, p. 11 ♦ SAT-87 en la nordfranca Dinano, p. 14–15

♦ EAF havas novan kontonumeron, p. 20

ESPERANTOLEHTI

Esperanta Finnlando ♦ Esperantobladet

ISSN: 0787-8206

Kielipoliittinen kulttuurilehti. Suomen Esperantoliitto ry:n äänenkannattaja.
Språkpolitisk kulturtidskrift. Organ för Esperantoförbundet i Finland.
Kultura periodaĵo lingvopolitika. Organo de Esperanto-Asocio de Finnlando.
Perustettu/Grundad/Fondita 1918. Esperantolehti ekde/från 1989 lähtien.
Esperanta Finnlando 1918–23, 1948–53, 1959–1987.
Ilmestyy viisi kertaa vuodessa. Utkommer fem gånger i året. Aperas kvinfoje jare.

Toimitusryhmä/Redaktionsgrupp/Redakta grupo: ✉ eafgazeto@esperanto.fi
Päätoimittaja/Chefredaktör/Cefredaktoro: *Robert Bogenschneider*
Rusthollintie 6 C 10, 28430 Pori ✉ robog@gmx.de
Taitto/Layout/Enpaĝigo: *Maj-Lis Krouvi* ✉ maj-lis@maisanjapa.info
Vastaava toimittaja/Ansvarig redaktör/Respondeca redaktoro: *Tuomo Grundström*

Tilauhinta/Prenumerationspris/Abonprezo: 24 EUR/vuosi/år/jaro
Jäsenhinnat: katso jäsenjärjestöt-sivu/ Por membroj: rigardu antaŭlastan paĝon

Tilaukset, osoitteenmuutokset/Abonoj, adresŝanĝoj:
Suomen Esperantoliitto, Siltasaarekatu 15 C 65, 00530 Helsinki.
☎ 044 2642 742 ✉ eaf@esperanto.fi

Prenumerationer, adressförändringar: EAF, Broholmsgatan 15 C 65, 00530 Helsingfors.
Pankkitili/Bankkonto: FI82 5721 1520 2859 38 OKOYFIHH.

Julkaisija/Utgivare/Eldonanto: Suomen Esperantoliitto ry – Esperanto-Asocio de Finnlando.
Painosmäärä/Upplaga/Eldonkvanto: 300
Kansi/Pärm/Kovrile: Sonkajärvi, Foto: *Robert Bogenschneider*

Esperanto-Asocio de Finnlando ♦ Suomen Esperantoliitto ry

Fondita/Perustettu/Grundad: 1907

Prezidanto/Puheenjohtaja/Ordförande: *Tuomo Grundström*
Anundilankatu 3, 26100 Rauma. ☎ 0440 199 766 ✉ eafprezidanto@esperanto.fi

Vicprezidanto/Varapuheenjohtaja/Vice ordförande: *Päivi Saarinen*
Ruorimiehenkatu 5 C 23, 02320 Espoo. ☎ (09) 813 3217 ✉ paivi.saarinen@iki.fi

Sekretario/Sihtööri/Sekreterare: *Tiina Oittinen*
Puutarhakatu 26 A 11, 20100 Turku. ☎ (02) 230 5319 ✉ eafsekretario@esperanto.fi

Aliaj estraranoj / Hallituksen muut jäsenet / Övriga styrelsemedlemmar:
Robert Bogenschneider, Rusthollintie 6 as. 10, 28430 Pori. ☎ 040 352 4685 ✉ robog@gmx.de
Tiina Kosunen, Viittakorpi 2 D 22, 02280 Espoo. ☎ 044 576 3314 ✉ tiina.kosunen945@gmail.com
Arja Kuhanen, Saratie 2, 31300 Tammela. ✉ arja.kuhanen@netti.fi
Paula Niinikorpi, Rusthollintie 6 as. 10, 28430 Pori. ☎ 040 527 4821 ✉ paula.niinikorpi@gmail.com

Vicestraranoj/Varajäsenet/Suppleanter:
Tapani Aarne, Epilänkatu 41 E 7, 33270 Tampere. ☎ 050 5245 823 ✉ tapani.aarne@mbnet.fi
Börje Eriksson, Erkontie 24 C 11, 16300 Orimattila. ☎ 040 779 3487 ✉ esperarto@phnet.fi
Tuomas Latva-Pirilä, Ratakatu 6 as. 12, 96100 Rovaniemi. ☎ 0400 702 816 ✉ tuomas.latva-pirila@suomi24.fi

Kasisto/Rahastonhoitaja/Kassör: *Tiina Kosunen*
Viittakorpi 2 D 22, 02280 Espoo. ☎ 044 576 3314 ✉ eafkasisto@esperanto.fi
Pankkitili/Bankkonto (EAF): FI82 5721 1520 2859 38 OKOYFIHH.

Peranto de UEA / Maksut UEA:lle / Betalningar till UEA:
FI66 8000 2005 9953 69 DABAFIHH (UEA/EAF Päivi Saarinen)
Adreso ĉe la EAF-oficejo. / Käytä Suomen Esperantoliiton toimiston osoitetta.

Oficejo/Toimisto/Kontor: Siltasaarekatu 15 C 65, 00530 Helsinki, avoinna tiistaisin klo 17–19.
☎ 044 2642 742 (puh.vastaaaja/respondilo). Malfermita: marde 17–19-a horo ✉ eaf@esperanto.fi

Internet: www.esperanto.fi ♦ www.facebook.com/Finnlando ♦ Twitter: @finnlando aŭ twitter.com/#!/finnlando

Homoj, ne nacioj nek ŝtatoj

Antaŭ precize 70 jaroj, la 4-an de septembro 1944, la milito inter Sovetunio kaj Finnlando daŭranta tri jarojn, du monatojn kaj naŭ tagojn estis finita je paŝĉesigo. La 19-an de septembro estis subskribita provizora packontrakto. Tiuj datoj ĉirkaŭ la apero de ĉi tiu EL-numero meritas esti prifestataj kiel komenco de la plej longa pacperiodo ĝisnuna por Finnlando (definitive militagoj ĉesis nur la sekvan jaron fine de aprilo post repuŝo de la germana militforto el Laponio).

Festan etoson tamen ombrigas tio, ke pasinta somero ne alportis solvon en Ukrainio (nek en Sirio, Egipto, Libio, Irako, Afganio...), sed male akriĝis la situacion. La konflikton oni devas nomi milito – civila milito, kiun neniu deklaris, interna milito, kiu ne estus ebla sen ekstera apogo al ties flankoj. Per milito iuj, malmultaj, ŝajne profitas, kaj ĉiuj suferas, ankaŭ eventualaj ”venkintoj”. Inter la viktimoj estas ankaŭ tricent homoj en pasaĝera aviadilo paffaligita super la konflikta areo – homoj absolute eksteraj.

Al ni esperantistoj, kiel al ĉiuj, estas malfacile rilati al tia situacio. Somerkomence mi skribis ĉi-loke pri agresiva nacionalisma propagando diversflanka kiel nutraĵo militarisma. La lando estas en danĝero esti puŝita sur vojon de Jugoslavio, Sirio, Egipto. Nun en la verka momento validas paŝĉesigo, tamen jam loke rompiĝa. Ni kiel esperantistoj kaj internaciuloj klopodu kompreni, sed nepre evitu alproprigi kialojn de popola subteno al (aŭ almenaŭ elteno de) tiaj politikaj gvidantoj, kies agojn ni trovas malaprobindaj.

Mi ĉi tie rekomendu por kompreni Ruslandanojn verkon de ĵurnalisto kaj esperantisto *Kalle Kniivilä* aperintan antaŭnelonge svede, finne

kaj esperante (*Putins folk, Atlas; Putinin väkeä, Into-Kustannus;*

Homoj de Putin, Flandra Esperanto-Ligo), aĉetebla finne en librovendejoj kaj esperante ĉe EAF aŭ www.retbutiko.net (FEL). – Kalle prilumas, kiel sentas ordinaraj homoj, kaj ankaŭ elfosas historiajn donitaĵojn. Pri la historio atentigis ankaŭ inter aliaj *Heikki Talvitie* (Finnlanda ambasadoro en Moskvo 1988–92, dum la disfalo de Sovetunio; Kalle cetere samtempe tie estis korespondanto de finna ĵurnalo). Talvitie komparas interese la historiajn Karelion kaj Krimeon kiel pecojn en senskrupula puzzle de imperioj.

Somerkomence ni sciis, ke niaj samideanoj en Krimeo malgraŭ ĉio planas aranĝon. El artikolo de *Jefim Zajdman* en la aŭgusta-septembra kajero de *La Ondo de Esperanto*: ”*Dum la dek unuaj tagoj de julio en la turista ripozejo Espero, sur la strato Esperanto en Tarhankut (Krimeo) okazis esperantista renkontiĝo. Ĝin oni ekpreparis pasint-jare, sed pro la milito en Ukrainio la renkontiĝo iĝis malpli granda ol planite. Dudeko da esperantistoj el Jalto aktive partoprenis la programon. (-) Krimea Esperanto-Centro aperis post la referendumo en Krimeo, ĝi estas neŭtrala kaj sendependa de la Esperanto-asocioj en Ukrainio kaj Ruslando. La aktivuloj de la Jalta Esperanto-Klubo, kiu estas kerno de la Krimea Esperanto-Centro, estas kontentaj, ke en Tarhankut aperis la unuaj esperantistoj.*”

Ni esperantistoj esence ne estu unuavice nacioj nek ŝtatanoj, sed homoj al homoj.



Tuomo Grundström

La 99-a Universala Kongreso en Bonaero, Argentino

Malproksima kaj intima kongreso

La 99-a Universala Kongreso de Esperanto en Bonaero, Argentino, de la 26-a de julio ĝis 2-a de aŭgusto estis unu el la plej malproksimaj Universalaj Kongresoj por finnlاندanoj, eble nur la kongreso en Adelajdo estis pli fora. Tial nur sep finnoj partoprenis kaj ankaŭ aliaj eŭropanoj estis tiom malmultaj, ke la kongreso estis la plej malgranda post 1920, kun nur ĉirkaŭ 700 aliĝoj kaj eble 600 ĉeestantoj. Nu, la vojaĝo estis iom laciga, noktaj flugoj tien kaj reen.

Malgraŭ tio, ke la kongreso estis malgranda, la aferoj okazis en tri ĉefaj ejoj. La ĉefa kongresejo *Panamericano* estis tipe luksa hotelo kun funkciantaj ejoj. La movada foiro okazis en alia hotelo, kaj multaj solenaĵoj kaj kulturaj prezentadoj en la teatro *Metropolitan*. Tamen la ejoj estis taŭge elektitaj, tiel ke sentebliis, ke ili estas plenaj, kaj foje preskaŭ mankis lokoj.

La urbo mem estis miksaĵo de diversaj stiloj, unuflanke pompaj klasikstilaj konstruaĵoj de antaŭ jarcento, kelkloke tute pompaj modernaj vitraj ĉielskrapantoj kaj ankaŭ signoj de ekono-

miaj problemoj: homoj dormantaj surstrate kaj truoj en balustradoj. En turismaj lokoj aŭdeblis daŭra kriadado de monŝanĝemuloj, kun pli bona kurzo, sed ankaŭ la risko ricevi falsan monon. Dum la kongresa semajno la Argentina ŝtato estis deklarita nepagipova rilate siajn eksterlandajn ŝuldojn, sed tio neniel videblis surstrate; manifestacioj, jes, certe, sed ili okazis konstante pri ajna temo. Eble pro la malbona ekonomia situacio ne okazis urbestra akcepto. Mankis ankaŭ aliaj kutimaj programeroj, i.a. plene forgesiĝis programero pri belartaj konkursoj.

Necesis ankaŭ improvizi en pluraj aliaj programeroj. Aŭkcio ja okazis malgraŭ manko de aŭkciisto *Tonkin*. La rezervaj kandidatoj *Mark Fettes* kaj *José Antonio Vergara* interkonsentis samtempe ĉeesti en kunsido kaj rezultis, ke *Osmo Buller* devis aŭkcii la aferojn. Malgraŭ sia senkulpigo, ke kiel finno li ne povas fari similiajn piroteknikaĵojn kiel *Humphrey Tonkin*, la aŭkcio tamen pasis tre bone. La plej multekosta kaj dezirata ŝajnis esti la aliĝnumero unu por la venontjara kongreso, kiun gajnis *Synnöve Mynt-*



Fermo de la UK, meze Osmo Buller kaj Mark Fettes.



La aukciinto Synnöve donacis la kongresnumeron Unu al la prezidanto de la LKK de la 100-a UK en Lillo, Francio

tinen, kiu tamen donacis ĝin al la prezidanto de la LKK de la venonta UK, *Xavier Dewidehem*.

Nu, ne mankis emociaj momentoj. La inaŭgura parolo de Mark Fettes estis tute brila, same emocia estis la akcepto de la kongresa flago fare de la LKK-prezidanto de la 100-a UK, kaj la monda premiero de serba filmo "Laŭ la spuroj de Tibor Sekelj" (kun esperantaj subtitoloj), kiun filmis du serbaj filmistoj en Suda Ameriko en 2005 vizitante lokojn, kiujn *Sekelj* vizitis. Por sportemuloj io tute nova estis la organizo de futbalmatĉo de rapide kunmetita esperanta teamo kontraŭ armen-devena argentina teamo. Nu, ĉar la esperanta teamo eĉ ne provludis kune, la rezulto estis ja atendinda 8–3 por la armena teamo.

Francisco Veuthey, nederlanda argentina, al kiu oni atribuis la unuan ideon okazigi la kongreson en Bonaero, prelegis pri la historio de Argentino miksante la erojn el sia familia historio kun la historio de la lando. Nu, historio ne estas facila afero, kio rimarkeblis en komentoj de la preleganto pri eventualaj aliaj opinioj de ĉeestantaj argentinanoj, aŭ ke kiam la preleganto diris, ke britoj atakis al Argentino du-foje, el la publiko iu kriis: tri.

Preskaŭ mankis kritiko ĉe la kutimaj "plendokunsidoj" *Estraro respondas* kaj *Centra Ofi-*

cejo respondas. Ŝajnas, ke la membraro, aŭ almenaŭ tiu parto, kiu venis al Bonaero, havas grandajn esperojn kun la nuna estraro de Mark Fettes. La prezidanto mem konstatis, ke ne ĉio iris tiel bone kiel planite, ekzemple terure malfruis la jarraporto de la estraro, kiu haveblis nur tagojn antaŭ la kongreso. La ĉefa kritiko tamen venis ĉe la programero *Legantoj de Esperanto*, kie la nova redaktoro *Fabricio Valle* longe klarigis sian laboron kun la revuo. Temis pri kritiko por tro malgrandaj literoj. Valle promesis korekti multajn aliajn aferojn, ekzemple ne plu uzi tro fortajn kolorajn fonojn ĉe tekstoj, sed ne la grandecon de literoj.

Ankaŭ la kongresaj tagoj ricevis novajn nomojn surbaze de la nova laborplano: *tago de konsciigo*, *tago de kapablo*, *tago de komunumo* kaj *tago de kunordigo*. IKU-prelegoj fokusigis al tre diversaj temoj de lingva justeco al pliacidiĝo de oceanoj, sed la IKU-libro aperis en inversigita paĝordo, tiel ke la paĝo unu estis ĉe la fino. En la movada flanko la plej grava novaĵo estis, ke la komitato akceptis post multjara diskutado la regularon por reta voĉdonado, kiu ebligis ke la komitatoj voĉdonu rete kaj ne nur en kunsidoj dum UK.

Jukka Pietiläinen



Ŝtuparo en la kongreshotelo "Panamericano"



Subtenantoj por la piedpilka matĉo Esperanto kontraŭ Armena elekto – ne helpis: la esperantanoj perdis 8 kontraŭ 3 goloj.

Aŭtunaj Tagoj en Iisalmi

Fotoj: Sylvia Hämäläinen, Saliko kaj RB

Dek jarojn post la pasintaj Aŭtunaj Tagoj en Iisalmi, *Onni Kauppinen* denove invitis nin al la savonia urbo.

Niaj ĉ. 50 partoprenintoj povis ĝui la pasintnumere anoncitan abundan programon, kiu konsistis el ekskursoj, prelegoj (de *Reino Eriksson* pri *Eero (Ii)Salmelainen* kaj *Olli Pajula* pri ekzopolitiko) kaj distra vespera programo kun altnivela koncerto de la litova grupo *SEPA & Asorti* (kiuj eĉ partoprenis la litovan elekton por la Eŭropa Kantokonkurso en 2012).

La ekskursoj ravis per varia enhavo: jen enurbe, gvidata de *Likka Kauppinen*, kun vizito de la kutime ne alirebla eksa akvoturo kaj panorama rigardo super la urbon, jen en la belega naturo

ĉirkaŭ *Sonkajärvi*, kun vizito de muelilo kaj la fer-farejo *Jyrkkä*.

Aldone *Árpád* ofertis Esperanto-kolbason laŭ origine hungara maniero.

Ni vizitis la subĉielan laborejon de la lignoskulptisto *Erkki Rytönen*, kiu ĵus semajnojn antaŭe gajnis la duan premion en konkurso krei urso-skulptaĵojn.

Vizito de la tomboj de la lokaj literaturaj granduloj *Juhani Aho* kaj *Kauppi-Heikki* kaj rigardado en la ateliero de *Anu Matilainen* kun kafo kaj bongusta torto de *Patrik Lafitte* finis la gajetosajn Tagojn.

PN kaj RB



Esperantokakku. Esperantotorto.



Onni, umpisuora savolainen. Teksto ne tradukebla Esperanten.




Iisalmi.



Päivi voitti tikkakisan. Päivi gajnis dartkonkurson.



1. Iikka Kauppinen opastaa.
Čičerono Iikka Kauppinen.
2. Jyrkkä
3. SEPA kaj Asorti
4. Reino Eriksson
5. Urso. Karhu. (Erkki Rytkönen)
6. Puutaiteilija työssään.
Lignoskulptisto en laboro.



BET-50 en Jūrmala, Latvio

28.6.–5.7.2014 – vojaĝoletero



Oni multe dancis en BET.

Bonŝance mi povis vojaĝi kun familio *Terä-väinen* per ŝipo de Helsinko al Tallinn, de kie ni per ilia aŭto veturis al Rigo. La tereno estis ebena, la vojo bona kaj eĉ pli bona la kompanio. La arbaroj kaj herbejoj nur iom diferencis de la finnaj. En la sekva tago ni promenis en la malnova Rigo. Sub iu portalo virino ludanta kanteleon ludis por ni la finnan nacian himnon *Finlandia*, ĉar ŝi supozis, ke ni parolas finne, kvankam ni parolis Esperante. Posttagmeze ni aŭtis al *Jūrmala* (esperantigita nomo: ”urbo sur ondo”, loĝantaro pli ol 56 mil), al la Hortikultura mezlernejo en *Bulduri*. Ĝia granda parko estas bone prizorgata: rozoj, jasmenoj, nimfeoj en lageto, altegaj pinoj kaj aliaj arbegoj. Kelkaj el la partoprenantoj de BET perpiede ekskursis en la dendrologia parko.

En la interkona programero ĉirkaŭ 50 fruevintoj kunvenis en la salono. Ĉiuj prezentis sin.

Komputile ni vidis prezentaĵon pri Latvio fare de *Genovefa Tamane*. Ni ricevis ankaŭ specialan bombonon BET-50. Post tio unuj enlitiĝis, aliaj komencis danci. Entute ĉirkaŭ 150 esperantistoj el dekkvino da landoj partoprenis en la 50-aj Baltiaj Esperanto-tagoj.

Dimanĉe en la solena malfermo *Biruta Rozenfelde*, la iniciatinto de la unua BET, rakontis pri la unuaj tendaraj subĉielaj BET-oj. Vespere koncerto de *Austra Pumpure* kaj ŝia ensemblo *Animo*. La festosalono estis belege ornamita per multegaj floroj, ĉar la antaŭan tagon samloke okazis la disdonado de diplomoj de la Hortikultura mezlernejo. Poste

Esperantotur el Pollando montris filmojn. Kortuŝe estas nun pensi, ke nur kelkajn semajnojn poste *A. Grzębowski* mortis dum la 99-a UK.

Lunde komenciĝis la elementa kaj paroliga E-kursoj, kaj samhore la prelegoj de la Somera Universitato, ekfunkciis ankaŭ Libroservo. Oni povis konatiĝi kun la latva lingvo, kun dancoj kaj ludoj. Okazis amuza aŭkcio, fare de *T. Grundström*, kaj sekvis lumspektaklo de *Solotronik*. La lumetoj dancis sur la plafono kaj kurteno de la scenejo en kompleta mallumo. Solotronik havas bonan voĉon, sed ial li nur moviĝadis en mallumo, kun lampoj sur sia kapo. Oni apenaŭ vidis la viron, nur la lampe-tojn.

La prelegojn de la Somera Universitato aŭskultis averaĝe po 45 personoj: pri la jaro 1914-a (*A. Zigmunde*), pri manĝo kaj sano

(*T. Hirsik*), pri du finnaj verkistinoj (T. Grundström kaj Saliko), pri malsamaj vidpunktoj (*V. Teräväinen*), pri pollanda arbarego kun ravaj fotoj de sezonoj (*N. Pietuchowska*), pri boatado en Litovio, ankaŭ tio kun bonaj fotoj (Klubo Juneco), pri monda turismo (*A. Grzębowski*), pri la latva fabelisto *Margarita Stāraste* kun fotoj (*L. Bērce*), pri Belgio (*M. Cuffez*). Mi devis konstati, ke multege evoluis la tekniko, preskaŭ ĉiuj prelegantoj lerte uzas la helpon de komputilo, aŭ lertulo helpas ilin uzi ĝin. Aldone en la Universitato *N. Caragea* prezentis fabellibrojn esperantigitajn de ŝi mem kaj ĝuide laŭlegis plej saĝajn partojn el ili. Admirinda komputila

prezentaĵo estis "Koloraj fabeloj." La latva skipo prezentis la plej amatan poeton *Imants Ziedonis*, kun moviĝantaj koloraj ilustraĵoj.

Aperis ĉiutage la informilo ORA BETANO. En ĝi eldoniĝis i.a. poemoj de la finna poetino *K. Vala*, esperantigitaj de T. Grundström (preleginto pri ŝi). En la ekskursita tago ni busis al palaco kaj kastelo de *Rundāle* kaj *Jelgava*. Post la solena fermo, antaŭ ol vojaĝi hejmen, kelkaj el ni reariĝis en la korto de s-ro *Aldis Bušs* en Rigo por ĝui rostadon, babiladon, kantadon, senzorgan kunestadon ĉe bivakfajro en bela ĝardeno.

Saliko

Vintraj Tagoj en Tampere 7.–8.3.2015

Vintraj Tagoj de EAF estos aranĝitaj kunlabore kun la loka membroasocio Esperanto-societo Antaŭen. La loko estas ejo de la Internacia Funkcicentro en Tampere (*Tampereen Kansainvälinen toimintakeskus*), kie diversaj amikecocietoj havas siajn ĉambretojn. Ĝi situas en la adreso Suvantokatu 13 en la dua etaĝo. La distanco de la fervoja stacio estas 300–350 metrojn kaj egale de la aŭtobusa stacio; proksime de la ortodoksa preĝejo. En la proksimeco de la ejo situas vasta elekto de diverstipaj restoracioj.

La partoprenantoj aranĝu mem sian tranoktadon. Ankaŭ tiusence ekzistas bona elekto de lokoj sufiĉe proksime (ekz-e la nova 25-etaĝa *Sokos Hotel Torn* Tampere malfermiĝas nun oktobre).

En la programo estos krom la jarkunveno aktualaj aferoj en formo de prelego kaj diskuto kaj kompreneble turismaj vizitoj al Tampere. La preparoj komenciĝis kaj detaloj aperos en la sekva Esperanta Finnlando (5/2014) en decembro kaj eble baldaŭ en la paĝaro de EAF (www.esperanto.fi).

Suomen Esperantoliiton talvipäivät 2015 järjestetään Tampereella yhteistyössä paikallisen jäsenjärjestö Esperantoseura Antaŭen r.y:n kanssa. Paikka on Tampereen kansainvälinen toimintakeskus (osoite: Suvantokatu 13, toinen kerros), jossa on eri ystävyysseuroilla omat toimitilansa. Etäisyys rautatieasemalta ja linja-autoasemalta on 300–350 metriä, ja sijainti aivan ortodoksikirkon lähellä. Paikan läheisyydessä on useita erityyppisiä ravintoloita.

Jokaisen osallistujan tulee järjestää majoituksensa omatoimisesti. Tähän liittyen läheisyydessä on melko suuri valikoima paikkoja (esim. uusi 25-kerroksinen Sokos Hotel Torn Tampere avautuu lokakuussa).

Vuosikokouksen lisäksi ohjelmassa on luentoja ajankohtaisista aiheista ja tietenkin kaupungin nähtävyyksiin tutustumista. Valmistelut on aloitettu ja yksityiskohtaiset tiedot tulevat seuraavan Esperantolehden numeroon (5/2014), ja Esperantoliiton verkkosivulle www.esperanto.fi mahdollisimman pian.

Bonvenon al Tampere!

Esperantistoj en Fabellando

La klasĉambro en la Instituto de Orivesi (Oriveden opisto) fariĝis lando de fabeloj por kvin tagoj 14.–18.7.2014. La nepublike elektita reĝino estis *Gražina Opulskienė*, kiu venis el la lando Litovio por renkonti kaj regi siajn dek unu subulojn. Ŝi kreis agrablan atmosferon, kvankam ŝi "devigis" ĉiun subulon paroli en sia vico. Gražina gvidis nin en la fabela lando laŭ diversaj padoj.

Jen kelkaj padoj: Ni konatiĝis kun multaj fabeloj, plejparte nekonataj, tralegante ilin senvoĉe aŭ laŭte laŭvice. Se ĉiu havis apartan fabelon, ĝia enhavo poste estis prezentita al la aliaj. Aŭ ni plenigis en fabeloj "truojn" kun pronomoj aŭ afiksoj. Aŭ ni aranĝis slipete dividitan fabelon en legeblan ordon kaj poste kompreneble rakontis ĝin. Aŭ ni klopodis rekoni fabelojn laŭ eltiraĵoj, el kiuj preskaŭ ĉiujn ni konis, almenaŭ iu el ni. Aŭ ni konatiĝis kun la vivrakontoj de fabelistoj de antaŭ pluraj jarcentoj. Reĝino Gražina promesis aldoni inter ili el la pasinta jarcento *Tove Jansson*, kies libron *Muminvalo* ŝi ricevis fine de la kurso. Rolantoj

de fabeloj ofte estas bestoj. Tial ni klopodis lerni la nomojn de kelkdeko da bestoj per helpo de "identigiloj". Ni kreis sufiĉe fabelan semajnan programon por iu reganto. Eble nia reĝino tiun iam realigos.

La reĝino kun siaj subuloj vizitis la artcentron *Purnu* pri moderna arto. La vojo tien tra belega mezfinna pejzaĝo kun kurba vojo, bone kreskantaj kampoj kaj verdaj arbaroj estis vera fabeleca artaĵo de la Kreinto. La artaĵoj en *Purnu* estis rigardendaj sed ne tiom ĉarmaj. Ni ankaŭ "vizitis" Litovion kun Zamenhof kaj Japanion lernante involvi aĵojn en tukojn, la arton *furoŝiki*. Ni rostis kaj ĝuis kolbasojn ĉe fajro kaj rondiris taskopadon, kiun preparis la subuloj *Terhi* kaj *Jukka*.

En la fino de sia vizito en nia lando la reĝino Gražina esprimis sian kontenton pri la subuloj kaj disdonis al ni atestilojn pri tio. Ankaŭ la subuloj estis kontentaj pri ŝi.

raportis
la subulo *Sylvia Hämäläinen*

Salutojn de Gražina

Karaj gekursanoj, mi kun plezuro memoras nian fabelan laborsemajnon kaj mi opinias, ke nia grupo ege bone koincidas kun la slogano de Eŭropa Unio "Lernado dum la tuta vivo". Mi

elkore deziras, ke vi ĉiuj estu same lernemaj, energiaj kaj junanimaj.

Elkore Gražina

Yritys kääntää lapsen luovuutta ja tahatonta, mutta naulankantaan osuvaa komiikkaa/ Provo redoni esperante infanan lingvan kreaĵon

Viisivuotias kertoo: "Meillä on mummin kanssa salakieli." "Mikä sen nimi on?" "En tiedä... Tai tiedän." Parin sekunnin päästä: "Mummiiri!"

Kvinjarulino raportas: "Ni, mi kaj avinjo, kreis propran lingvon." "Interese. Kia estas la nomo de tiu lingvo?" Ŝi pripensas du sekundojn: "Nu... Hum... Avinjido!"

Raporteto de kursano

Estis foje en Orivesi-Instituto somera kurso bazita sur fabeloj. La trian julian semajnon tien alvenis 11 esperantistoj por ke ili plibonigu sian lingvoscion kaj konatiĝu kun samideanoj.

Ŝajnas, ke Litovio estas plena de bonaj, ĉarmaj instruistinoj de Esperanto. Estis ja la duan jaron sinsekve, kiam ni havis tre agrablan kaj kapablan litovian instruistino. *Gražina Opulskienė* uzis fabelojn kiel materialon, kio tre plaĉis al mi. Unu tagon ni priparolis pri tri revoj de nia infaneco kaj ĉu niaj revoj de hodiaŭ estas samaj; alian tagon ni rakontis, kiam floroj speciale plezurigis nin. La tria hejmtasko estis priskribi situacion, kiam ni sentis: tio ĉi ne estas vera. Mi estas en fabelo!

Ni konatiĝis kun fabelaj verkistoj kaj duope rakontis al la grupo ekz. pri la fratoj *Grimm*, *H.C. Andersen* kaj *Charles Perault*. Ni ankaŭ priparolis, kiu en nia infaneco legis aŭ rakontis fabelojn al ni. Kune ni inventis fabelon, daŭrigante la rakonton post la lastaj vortoj de la antaŭa parolanto. Ĉiu rakontis 2–3 frazojn.

Bestoj aperas en multaj fabeloj, kaj marde ni lernis tiun ĉi vortaron per helpo de buntaj bildoj. Ĉiuj multigitaj paperoj dum la semajno estis kolorriĉaj – ruĝaj, verdaj, flavaj ktp, kio ĝojigis min. Merkrede ni lernis florojn: ĉiu elektis el bildkartoj planton, kiun oni ne konis, kaj prezentis ĝin: ”Mi estas galanto, nun floras galanto, sed nun ĝi velkis kaj nun floras ...”

Gražina kapablis krei etoson, kie ĉiu kuraĝis paroli, kvankam almenaŭ mi ne tuj trovis ĝustajn vortojn. Ŝiaj studmetodoj estis variaj. Ni uzis multajn sensojn kiam ni identigis, kiuj aromoj kaŝiĝis sub la truitaj stanofoliaj kovriloj de forĵetablaj taso, aŭ palpis, kiuj plastaj fruktoj aŭ legomoj estis en ŝtofa sako. Ni ankaŭ povis proponi, kiel kanti unu litovian popolan kanton, la vortojn de kiu ni havis, kaj poste Gražina kantis ĝin al ni.

Aldone al lecionoj ni havis ankaŭ alian programon. Marde vespere *Terhi* kaj *Jukka* aranĝis kvizon pri Esperantujo kaj aliaj temoj en la ĝardeno de la instituto. La premioj ĝojigis nin, almenaŭ min la sako reklamante la UK en Tampere. – Ni ankaŭ rostis kolbasojn kaj maizajn pikojn. Terhi lerte savis unu pikon el inter la braĝoj. Merkrede Gražina instruis nin *furoshiki*, malnovan japanan arton involvi belajn pakojn kun kaptuko kiel pakumo. Ni ekzercis kun du libroj kaj unu botelo. Estis agraba variado fari ion per manoj kaj ne nur koncentriĝi en la lingvon dum la tuta tago. Ĵaŭde ni vizitis la ekspozicion de la somera ateliero de *Aimo Tukiainen*. Persone mi ŝatis la belan pejzaĝon ĉirkaŭ *Purnu* pli ol la artverkojn. Ankaŭ estis interese vidi la muzeajn objektojn en la kafejo. – Multfoje ni kantis kun la akompano de *Sylvia* kaj *Tiina*, kompreneble ankaŭ Fabellando'n. La kanto kun afiksoj precipe plaĉis al mi.

Ĉi-jare ni estis la solaj lingvolernantoj en Orivesi; nur kelkaj artlernantoj ĉeestis, kio ebligis ankaŭ al ni desegni *croquis* matene duonhoron, kiam juna virino pozis en diversaj pozoj 2–3 minutojn. Poste ni povis rigardi la artekspozicion sur la muro de la manĝosalono.

La tuta semajno estis kiel bela fabelo kun feliĉa fino. La vetero estis bona, kio gravis al ni. Kiam ni lernis interne, pluvo ne ĝenis nin. – Nur estis domaĝo, ke la afrika esperantisto ne povis alveni pro familia kialo, kaj tiel ĉiuj partoprenantoj estis finnoj, krom la instruistino.

Koran dankon al Gražina, Sylvia kiel ankaŭ al aliaj tampereanoj kaj Tiina pro ĉio, kion vi faris por ke la kurso sukcesu.

*Leena Lindqvist
el Kuopio*

Karavano al Lillo BL5 – Karavaani BL5 Lilleen

Ĉu ni denove vojaĝu per komuna aŭtobuso al la kongresa urbo? Mi petis oferton de nia konata buskompanio *Launokorpi* kaj ricevis la suban proponon. Necesas minimume 21 personojn por realigi la vojaĝon. Bonvolu aliĝi provizore al mi jam nun (ĝis la 10-a de oktobro) por ke ni vidu ĉu estas sufiĉe da interesiĝantoj. Certe denove estos bela kaj interesa vojaĝo! Pliaj informoj estas sube finnlingve kaj vi povos ĉiam demandi pli de mi.

Jälleen voitaisiin matkustaa yhdessä Esperanton maailmankongressiin. Sain seuraavan ehdotuksen kemiöläiseltä Launokorpi Oy:ltä, joka aikaisemminkin on järjestänyt bussimatkojamme. Hotellimajoitus Lillessä varataan vasta sitten kun varmistuu, että olemme lähdössä. Majoituksen voi tietenkin jokainen hankkia itsekin. Toivoisin alustavia ilmoittautumisia jo 10.10.2014 mennessä, jotta tiedämme onko karavaaniin kiinnostusta. Annan mielelläni lisätietoja. Tästä tulee varmasti taas hieno matka!

Reittiehdotus on tämän näköinen:

22.7. Tapaaminen Turussa, josta bussilla Naantalalin satamaan, Naantali-Kapellskär, Finnline-sin iltalaiva.

23.7. Ajo Kapellskär-Tukholma-Malmö, josta Finnlinesin laiva lähtee klo 22.00 Travemünde.

24.7. Travemünde saapuminen klo 7.30 ja ajo Lilleen, jossa perillä iltayöstä.

25.7.–1.8. UK en Lille, sopiva hotellimajoitus.

1.8. Iltapäivällä lähtö kohti Pohjois-Saksaa, yöpyminen matkalla.

2.8. Lähtö aamiaisen jälkeen, matkalla taukoja ryhmän toiveiden mukaan. Travemündessä viimeistään klo 23.00, Finnlinesin laiva lähtee kohti Helsinkiä yöllä klo 03.00.

3.–4.8. Merellä.

5.8. Saapuminen Helsinkiin aamulla, ajo Turkuun.

Matkan hinta ilman Lillen hotellia tulisi olemaan 860 euroa/henkilö (edellyttää vähintään 21 lähtijää). Hintaan sisältyy bussimatka ja laivamatkat jaetussa 2-hengen hyteissä sekä kaikki matkan tieverot. Hotelli Lillessä noin 400 euroa jaetussa 2-hengen huoneessa.

Bonvenon al la karavano BL5 – Tervetuloa BL5 bussikaravaanimatkalle!

Tiina Oittinen,

sekretario de EAF, liiton sihteeri

tiina.oittinen@pp.inet.fi, puh 050 549 4709.

Eroj el la Ondo de Esperanto 7/2014

En sufoka varmego somera refreŝigan venteton kunportis la alveno de LA ONDO de Esperanto en julio 2014. Tre koloran mozaikon pri Esperanto ofertas nia ŝatata revuo kaliningrada el Rusio. Regule kaj akurate ĝi aperas kaj estas atendata de multaj movadanoj. Jam dum pluraj jaroj mi apartenis al la abonantaro. Nun estis

speciala ebleco profunde studi la enhavon, kiu plene kaptis mian atenton.

Unue ricevis vicon etaj novaĵoj, kiuj ŝajnis esti kvazaŭ dolĉaj bombonoj por veterana leganto. Verkistino *Marjorie Boulton* festis sian naŭdekan naskiĝtagon en Oksfordo. Oni starigis ekspozicion pri ŝiaj verkoj multnombraj. Ĉirkaŭ

dudek gastoj partoprenis, i.a. *Paul Gubbins*, *John Wells*, *Edmund Grimley* kaj *Anna Löwenstein*. La tuta programo daŭris proksimume unu horon, post kio oni tagmanĝis kaj babilis en bela etoso. Indas menci, ke oni filmis la aranĝon.

Tre detale pri libroeldonado en Hungario 1976–1990 skribis *Vilmos Benczik*. Dum la menciita periodo HEA eldonis 138 librojn en/pri Esperanto. La suma eldonkvanto estis 368.948 ekzempleroj. Vendado de libroj al Sovetunio havis iom enigmajn kaj tikelajn trajtojn pro politikaj kaj burokrataj kialoj. La artikolo trafe raportas pri la eblecoj, kiujn utiligis tiutempaj esperantistoj por satigi legemulojn. Por multaj okcidentanoj Benczik malfermas nekonatajn faktojn kaj agadmanierojn. Nun ni vivas en tute alia mondo.

Dennis Keefe raportas pri subfakoj de merkato aplikataj al la Esperanto-movado. Ni ekscias komercajn principojn, kiujn iel estas utilaj diskonigi inter esperantistoj. Ne eblas tuŝi ĉiujn interesajn erojn, kiuj vere abundas en la revuo.

Aleksandro Korjenkov kompilis varian kaj multflankan legaĵon, kiu donas ion por ĉiuj. Indas subteni valoran laboron de sindona redaktoro. Persisteme li agas kaj ankaŭ atingas rezultojn. Proksimiĝas iom post iom la tempo por aboni ĉi-tiun prestiĝan publikaĵon. Oni povas legi LA ONDON en Turku en la ĉefa biblioteko ĉe la Kastela Strato. Indas esti inter la abonantoj.

Jorma Ahomäki

La polo Roman Dobrzyński konkeris novan terenon

Tre konata verko por multaj estas ”La Zamenhof-strato” lanĉita de Dobrzyński dum la Gotenburga Universala Kongreso en 2003. Oni antaŭvidis furoran sukceson sur la vendomerkato. Tiel ankaŭ okazis. Ĝisdate la libro estas eldonita en 14 lingvoj. Oni scias, ke la aŭtoro estas longjara ĵurnalisto kaj reĝisoro de la Pola Televido.

Pasintjare, 2013, aperis en Pollando “Rakontoj el Oomoto”, kiu portas la leganton al Japanio. Fascina estas la lando de la leviĝanta suno. Bonege nutras kaj subtenas nian entuziasmon la menciita verko kaj krome kvazaŭ aldone la filmo “Japana printempo”. Tiuj ĉi publikaĵoj kune facile aĉeteblaj estas indaj por trankvile digesti.

Jam 1959 la unuan fojon mi renkontis la aktivan oomotoanon *Eizo Ito*, kiu revenis tra Finnlando hejmen el Varsovio. Li prelegis en kelkaj lernejoj kaj rakontis, kion signifas la kulturreligia movado Oomoto, kies ĉefan kernon oni

povas esprimi jene: unu Dio, unu Mondo, unu Interlingvo.

Oni invitis redaktoron Dobrzyński por prepari sian libron pri Japanio, kie li pasigis entute 150 tagojn inter oomotoanoj. Multon li vidis kaj spertis. Kvazaŭ palpdistance li vidis kaj sekvis kiel la ĉiutaga vivo pulsadas. La movadanoj volonte raportis kaj klarigis detalojn. Oficialaj ŝtataj instancoj ankaŭ iam persekutis kaj provis forpeli kaj puni tute ordinarajn membrojn de Oomoto.

Sendube jam *Harry Halén* kaj *G.J. Ramstedt* enkondukis nin en la lokan movadon en Japanio. Nun estas bona okazo plilarĝigi informojn pri japanaj eroj sub la gvidado de Roman Dobrzyński. Sekvu talentan itineran stiriston.

Jorma Ahomäki

Aŭgusto 2014

*Rakontoj el Oomoto, 255 paĝoj,
“Skonpres”, Pollando 2013*

SAT-87 en la nordfranca Dinano

La ĉi-jara 87-a SAT-kongreso logis pli ol centon al la ĉarma mezepoka urbo Dinano en Bretonio (norda Francio).

Kiel kutime, krom la laborkunsidoj kaj asembleoj de la diversaj frakcioj (vegetarana, liberecana, anarkiema..) okazis riĉa programo el prezentoj, prelegoj, koncertoj kaj ekskursoj. Temo estis "Civitanoj loke konstruas ontecon" – jam la kunvenejoj kiel "Junlaborista hejmo" kaj Sociala Centro substrekis la kunlaboron kun socialaj institucioj. Eblis ekscii pri ekologia agrikulturo, loka interŝanĝa mono (*Maillette*, "najleto"), rikolto de spirulino-algoj, ekologia edukado de infanoj, same kiel enrigardi la poezian universon de *Federico Garcia Lorca* kaj rigardi bildojn el Patagonio aŭ kiel distribui informilojn.

Vesperaj koncertoj de la lokaj grupoj *An Teuzar* kaj *Estran* iom pliproksimigis la bretonan kulturon per muziko kaj dancoj, dum *Kapriol'* el Nederlando dancigis la publikon antaŭ la katedralo en vido de ĉirkaŭaj kafejoj.

Dum la teatra vespero ni spertis la bretonan rakonton "La fabo" de *Laurent Peuch* kaj la farsan tragedion "Karakalo" de *Serge Sire* per unika kombino de teatra prezentado, vortlutado

kaj prelego; la Internacia/Adiaŭa vespero donis eblecon al kelkaj prezenti tre diversajn erojn.

En la urbo ni ĉeestis tre akrobatan balancspektaklon *Circ Panic* el Hispanio kaj strat-teatron *Stromboli Magic Magic* de franca triopo.

Iuj partoprenis la antaŭkongreson al la mondheredaĵo Monto Sankta Mikaelo kaj Kabo Frehel, dum plejmulto ĝuis la tutagan ekskurson al la ĉefurbo de ostroj (*Cancale*) kaj la pli granda Manik-borda urbo Sankta Malo. Kelkfoje ni promenis tra la aĝaj stratetoj de Dinano, vidis la urbomuron kaj fortikaĵojn, kaj vizitis la ekologian cidromuzeon en proksima *Pleudihen* kun gustumado de iliaj produktoj.

Alia grupo vizitis ŝtonminejon kaj ekologie revigligitan bienon *Ville Heleuc*, kiu nun ampleksas pli ol 18 hektarojn kaj provizas 40% de sia elektrobezono el instalitaj sunpaneloj.

Entute estis inda kongreso, kun agrabla etoso kaj revido de konatoj aŭ ekkono de pliaj interesusuloj pere de Esperanto.

La venontjara 88-a SAT-kongreso cetere okazos en Nitra (Slovakio) – unu jaron antaŭ la 101-a UK samloke.


RB




Cancale



Circ Panic



Jak Le Puil



Malnova urbo



Kapriol'



Grupfoto



Urbomuro

Forpasis pastro Heikki Rantanen

Forpasis nur 59-jara pastro *Heikki Rantanen*, kiu en la 90-aj jaroj gvidis la Finnan Maristan Preĝejon en Roterdamo. Li faris el ĝia kristnaska bazararo grandan eventon. En interparolo kun li naskiĝis la ideo okazigi la unuan Malferman Tagon de la Centra Oficejo samtempe kun la Finna Bazararo en la lasta semajnfino de novembro 1994. Ĉar la UK de 1995 estis okazonta en Tampere, Finnlando, vizitantoj de MT povis jam spiri finnan etoson vizitante la bazaron en la preĝejo tute proksime al la CO. Ambaŭ eventoj plu okazas samtempe kaj ankoraŭ nun, 20 jarojn post la unua MT, pluraj vizitantoj iras ankaŭ al la Finna Ba-

zaro. Kvankam la forpasinta pastro ne estis esperantisto, li estis kunnaskinto de aparte sukcesa Esperanto-aranĝo. Mi konservos belan memoron pri tiu simpatia homo.

Rotterdamian merimieskirkon entinen pastori Heikki Rantanen kuoli yllättäen vain 59-vuotiaana. Hänen kanssaan sain 1994 idean oman toimistoni avointen ovien päivän järjestämisestä samaan aikaan kirkon joulumyyjäisten kanssa. Molemmat tapahtumat ovat yhä samana marraskuun viikonloppuna ja monet oman tapahtumamme vieraista käyvät perinteisesti myös merimieskirkolla.

Osmo Buller

Esperanto-societo en Turku informas

La aŭtuno en Turku kaj ĉe Esperanto-societo en Turku komenciĝis en kutimaj formoj: kursoj en *Aurala* kaj renkontiĝoj en la biblioteka kafejo. Dum somero ni ricevis kelkajn gastojn kaj eksterlande kaj enlande. Nun ni vidas unu la alian marde en Civitana Instituto de Aurala, kie okazas Esperantokursoj por progresantoj kaj elementanoj kaj merkredoj en la kafejo *Sirius*. En decembro okazos la tradicia jula festeto. Gastoj estas bonvenaj en ĉiuj aranĝoj kaj nature ĉiam ajn.

Informiĝu ĉe EST-anoj, kontaktuloj: Tiina Oittinen (tiina.oittinen@pp.inet.fi, tel. 050-5494709) kaj Leena Tiusanen (leena.tiusanen@elisanet.fi, tel. 050 575 7956).

Turun Esperanto-yhdistyksen syksy on käynnistynyt tavalliseen tapaan: esperantokurssit alkajille ja jatkaville ovat tiistaisin Auralan kansalaisopistossa ja keskiviikkoisin tapaamme Turun kaupunginkirjaston kahvila Siriuksessa. Pikkujoulut ovat perinteiseen tapaan joulu-kuussa. Vieraat ovat tervetulleita kaikkiin tilaisuuksiin ja toki muulloinkin.

Kerro tulostasi ja varmista tapaaminen, yhteyshenkilöt ovat: Leena Tiusanen, leena.tiusanen@elisanet.fi, puh. 050 575 7956 ja Tiina Oittinen, tiina.oittinen@pp.inet.fi tai puh. 050-5494709.

Eventokalendaro – Tulevia tapahtumia

2014

- 14.12. Zamenhof-tago en Helsinko

2015

- 7.–8.3. Vintraj Tagoj de EAF en Tampere
- 25.7.–1.8. La 100-a UK en Lille (Francio), verŝajne karavano el Finnlando

Somera E-studado (SES) en Slovakio

Ĉi-jare la internacia Esperanto-semajno okazis unuan fojon en du landoj: en julio en Slovakio (Nitra) kaj en aŭgusto en Rusio (rande de Moskvo). Nitra allogis 248 partoprenintojn el 28 landoj, inter ili kvar viddifektitoj; du el Finnlando, du el Hispanio. La E-semajnon en Rusio partoprenis 87 gelernantoj.

Unuan fojon *Kerttu Rita* partoprenis la Esperanto-semajnon en Nitra 2012. Pri la ĉi-jara kurso en Nitra ŝi raportis jene:

La universitata studenthejmo *Zobor* de nove ofertis taŭgajn lokojn por studado, distra programo kaj loĝado. La lernomaterialo kaj instruado estis bonaj. Nia grupo konsistis el 12 gelernantoj el ok landoj. Ioman mirigon vekis la scio, ke ni venis el la fora Finnlando, Nia instruisto estis *Johannes Müller* el Germanio. Kiam mi rimarkis, ke li parolas klare, mia streĉo

baldaŭ malaperis. Johannes forveturis por partopreni la UK-n en Argentino. Do, lastan tagon nin instruis la germandevena *Peter Weide*, kiu loĝas en Danio. Li havas danan akĉenton, sed mi bone komprenis lin.

Asta kaj mi ne partoprenis en ekskursoj, ĉar ni jam pasintfoje vizitis tiujn lokojn. Helpe de afablaj slovakaj junuloj ni vizitis la urbon por butikumi. Nia juna akompananto eĉ asistis en uzo de aŭtomato por ricevi monon. Li esperantigis konsilojn kaj *Asta* memstare agis. Nia hejmvojaĝo komenciĝis frumatene, je la 4-a horo. Eĉ tiam slovakaj esperantisto akompanis nin al la aŭtobusa stacio, kaj tie junuloj de Britio kaj Norvegio asistis nin.

Do, ni sentis resti en sekureco.

Kerttu Rita

Esperantlingva turisma broŝuro pri Turku

Esperanto-societo en Turku kunlabore kun la urba turista oficejo *Turku Touring* faris por Turku novan turistan broŝuron kiel retan version. La bazo de la broŝuro estas sama kiel en aliaj lingvoj, sed la teksto estas parte adaptita por niaj bezonoj. La tradukon faris laborgrupo *Paula Harju, Tiina Oittinen* ja *Leena Tiisanen*.

La broŝuro estas legebla en PDF-formo en la retpaĝo de Turku Touring www.visitturku.fi

(aŭ www.visitturku.fi/en aŭ www.visitturku.fi/sv). Vi elektu inter la lingvoj Esperanton. Sur la kovrilo troviĝas juna popkantisto *Robin Packalen* el Turku.

Laŭ peto ni povas sendi al vi la PDF-n per retroŝto.

*Atendante viajn komentojn,
Amike salutas el Turku
Leena, Paula kaj Tiina*

Esperanto-societo Antaŭen informas

- 24.09. je la 11.30 Esperanto-klubo de Antaŭen
 - 06.10. je la 17.00 Oktobra vespero
 - 03.11. je la 17.00 Novembra vespero
 - 17.11. je la 17.00 Elektokunveno
 - 15.12. je la 17.00 Zamenhof-vespero
- Iun estraron vi renkontas en *Nesto*, nia klubo, ĉiujn lundojn je la 16–17. Bv. vidi pliajn informojn ĉe la retejo www.esperanto.fi/tampere

Katri Vala.

la poetino de ekstazo kaj de la realo estis la temo de mia prelego en la 50-aj Baltiaj Esperanto-Tagoj en julio ĉijara.

Vizitante en Helsinki iru al la parko nomita je *Katri Vala* situanta en *Marjatanmäki*, ĉe strato *Hämeentie*, apud la metrostacio *Sörnäinen*. Piediro de la oficejo de EAF en la kvartalo *Kallio* longas unu kaj duonan kilometron. Tiu promeno iras laŭ la pejzaĝo de ŝia vivo en la 1930-aj, tiamaj laboristaj kvartaloj, pri kies vivo oni malmulton sciis en la suda centra urbo. Vi trovos sur rokmuro simplan bronзан ŝildon kun la teksto "Runoilija Katri Vala 11.X.1901–28.V.1944" – la naskiĝmonato estas malĝusta,

fakte estis septembro, sed tion la poetino certe pardonas al sia pentrista-grafikista amiko *Tapio Tapiovaara* (1908–82). La ŝildo estis fiksita en la 70-a datreveno de ŝia naskiĝo sur la ŝtono, en kiu ŝia cindro estis enmasonita en majo 1945; ŝi mortis en Svedio, en sanatorio de *Eksjö*.

Mi provis redoni specimenojn el ŝia verkaro, eble ne antaŭe tradukita Esperanten. Jen du el ili, frua "romantika" Katri kaj posta socia Katri.

tg

Somero en Sörnäinen

(El Paluu, *Reveno*, 1934)

Magra kaj serioza, fratet'
estas via vizaĝ'.

Asfaltodora estas somer'
kaj ombra la mura ŝtonaĝ'.

Malfacile vi spiras, infano,
vin surŝutas stratmalpur'.

Florojn kaj freŝan aeron
prirevi vi povas nur.

Ĉi tiu hejma kvartalo,
nesto de malriĉular',
donita neniam verdo
de parkoj, nek brizo de mar'
ĉi tien. Aliflanke de l' urbo
staras domoj sen homoj dum
somer', ĉar bonhavaj loĝantoj
kamparen veturis nun.

Via nomo

(El Sininen ovi, *Blua pordo*, 1926)

Neniam alian havas,
balbutas vian nomon en tenebro,
mi ridetas kaj lipumas vian nomon.

Ĝi estas kiel vivanta estaĵo,
varma, vortumetanta infano,
kiun nutras la ruĝa sango el mia buŝo
dum mi ridetas en tenebro
lipumante vian nomon

Sed senkonscie mi faligas larmojn.



Suomen Esperantoliiton jäsenjärjestöt

Muutokset ja lisäykset tälle sivulle: Esperanto-lehti/EAF, Siltasaarenkatu 15 C 65, 00530 Helsinki, s-posti eafgazeto@esperanto.fi.

Suomen Esperantoliiton paikallis- ja jäsenjärjestöt:

- ♦ Helsingin Esperantoseura / Esperanto-klubo de Helsinki, Siltasaarenkatu 15 C 65, 00530 Helsinki. www.esperanto.fi/helsinki_jukka.p@esperanto.fi (Jukka Pietiläinen)
- ♦ Iisalmen Esperantoklubi / Esperantoklubo de Iisalmi, (Onni Kauppinen) Uudispihantie 298, 74100 Iisalmi. ☎ 0500 813 530 onni.kauppinen@pp.inet.fi
- ♦ Jyväskylän Esperantokerho / Esperantoklubo de Jyväskylä (Kimmo Hannula) Esperantoklubo de Jyväskylä, c/o Kettunen, Keihäsmiehenkatu 3, 40630 Jyväskylä. ☎ 050 329 8202 kimmo.hannula@creavit.fi, www.esperanto.fi/jyvaskyla
- ♦ Oulun esperantoseura / Esperanto-societo de Oulu ry (Aini Vääräniemi), Vääräjärventie 26 A, 93590 Vanhala www.esperanto.fi/oulu_aini.esp@hotmail.com
- ♦ Salon Esperantoseura / Esperantoklubo de Salo (Matti Wallius) Eräpolku 1, 25130 Muurla matti.wallius@ebaana.net
- ♦ Esperantoseura Antaüen ry. / Esperanto-societo Antaüen, Satakunnankatu 30 C 6, 33210 Tampere. www.esperanto.fi/tampere (Jukka Laaksonen: jvaleta@kolumbus.fi) ☎ 050 5829 248)
- ♦ Turun Esperanto-yhdistys ry. / Esperanto-societo en Turku (Tiina Oittinen), Puutarhankatu 26 A 11, 20100 Turku. tiina.oittinen@pp.inet.fi ☎ 050 5494709
- ♦ Suomen opettajien esperantoyhdistys / Esperanto-Ligo de Finnlandaj Instruistoj, (Sylvia Hämäläinen) F. E. Sillanpään katu 2 C 46, 33230 Tampere. sylvia.h@kolumbus.fi ☎ 050 321 4313. Tilinro: FI08 4450 2320 0836 06 HELSFIHH (445023-283606)
- ♦ Sokeiden esperanto-yhdistys Steleto. (Ritva Sabelli) Pietarinkatu 10 D 27, 00140 Helsinki. ☎ (09) 660 651 steleto@pp.inet.fi
- ♦ Suomen nuorten Esperantoliitto / Finnlanda Esperantista Junulara Organizo (FEJO) Siltasaarenkatu 15 C 65, 00530 Helsinki. fejo@esperanto.fi. Tilinro: FI83 5630 0020 2136 06 OKOYFIHH (563000-2213606)

Jäsenyhdistysten jäsenet ovat automaattisesti Suomen Esperantoliiton jäseniä, yhdistykset

hoitavat jäsenmaksut liittoon. Esperantolehden hinta jäsenille on 16 EUR tilattuna jäsenjärjestöjen kautta. Liittoon voi myös kuulua henkilöjäsenenä, jolloin jäsenmaksu on 22 EUR sisältäen Esperantolehden. Nino Runeberg -seuran jäsenmaksu on 44 EUR. Lisätietoja jäsenyhdistyksiltä ja liiton toimihenkilöiltä.

Lahdessa on esperantoharrastajien ryhmä, joka kokoontuu tarpeen mukaan. Lisätietoja saa Börje Erikssonilta (EAF:n hallituksen varajäsen). esperanto@phnet.fi.

Lappeenrannassa toimii aktiivinen esperanton harrastajien ryhmä. Lisätietoja: Jorma Toropainen, puh. 040 7510535, s-posti jormato35@gmail.com.

Aktiivisia harrastajia on myös mm. Hämeenlinnassa, Mikkelissä, Porissa, Raumalla ja Taivalkoskella. Paikkakuntien yhteyshenkilöistä saa tietoa Suomen Esperantoliitolta.

ESPERANTOLEHTI

ilmestyy vuonna
aperas dum la jaro

2014

Nro	Limdato	Aperas
5/2014	15.11.	en decembro

Ilmoitushinnat ♦ Anonprezoj

Ulkopuoliset mainostajat /

Ekster membraro:	Jäsenet / Membroj:
1/1 sivu/paĝo 100 EUR	1/1 sivu/paĝo 50 EUR
1/2 sivua/paĝo 60 EUR	1/2 sivua/paĝo 30 EUR
1/4 sivua/paĝo 40 EUR	1/4 sivua/paĝo 20 EUR

Sendu la anoncojn aŭ rete al la redakto:
eafgazeto@esperanto.fi aŭ poŝte al la oficejo: Esperantolehti/EAF, Siltasaarenkatu 15 C 65, 00530 Helsinki.



Itella Green

Esperantoliiton tilinumero on vaihtunut, EAF havas novan kontonumeron, EAF har nytt kontonummer

Suomen Esperantoliitolla on uusi pankkitili Helsingin Osuuspankissa, Tapiolan konttorissa. Uusi tilinumero on:

IBAN FI82 5721 1520 2859 38
BIC OKOYFIHH

Tiliä kannattaa käyttää heti. Vanhat viitenumerot toimivat uuden tilin kanssa.

Danske Bankin tili lopetetaan vielä tämän vuoden aikana. Lopetetulta tililtä ei valitettavasti ole edelleenohjausta uudelle tilille.

Huomaathan, että maksut UEA:lle hoidetaan edelleen sille tarkoitettun peranto-tilin kautta, joka ei nyt vaihdu.

Jos tulee kysyttävää tai ongelmia viitenumeroiden kanssa, voitte ottaa yhteyttä taloudenhoitajaan, eafkasisto@esperanto.fi

EAF sanĝis bankon kaj nun ni havas novan konton en Helsingin Osuuspankki:

IBAN FI82 5721 1520 2859 38
BIC OKOYFIHH

La nova konto estas uzebla kun la malnovaj referencnumeroj. Ni nuligos la malnovan konton

ĉe Danske Bank dum la jaro 2014.

Bonvolu rimarki, ke por la pagoj al UEA oni ankoraŭ uzos la saman peranto-bankkonton kiel antaŭe. La peranto-bankkonto ne ŝanĝiĝas nun.

Se vi havas problemojn aŭ demandojn, bonvolu kontakti eafkasisto@esperanto.fi

Esperantoförbundet i Finland har öppnat ett nytt konto i HELSINGFORS OP BANK ABP, kontoret i Hagalund.

Vårt nya kontonummer är:

IBAN FI82 5721 1520 2859 38
BIC OKOYFIHH

Det lönar sig att använda det nya kontot genast. De gamla referensnumrena fungerar med det nya kontot.

Kontot hos Danske Bank avslutas i år och det blir tyvärr ingen vidarebefordring till det nya kontot.

Märk väl, att betalningarna till UEA sköts via samma konto som tidigare, peranto-kontot ändras inte nu.

Ifall problem uppstår, ta kontakt med kassören, eafkasisto@esperanto.fi

Seuraava numero ♦ Venonta numero

Seuraava numero ilmestyy joulukuussa. Aineisto 15.11.2014 mennessä toimitukseen. La venonta numero aperos en decembro. Artikoloj ĝis 15.11.2014 al la redakcio. Osoite/adreso: Esperantolehti/EAF, Siltasaarenkatu 15 C 65, 00530 Helsinki, s-posti/rete: [<eafgazeto@esperanto.fi>](mailto:eafgazeto@esperanto.fi).